KAMPANJAJ NOVAĴOJ

Unuiĝintaj verdulaj partioj eŭropaj

KAMPANJAJ NOVAĴOJ DE EŬROPAJ VERDULOJ - ELDONO 4 –

Novaĵoj de la 27a de majo ĝis la 3a de junio 2009

LA SEKVONTAj NOVAĴOj ENHAVOS LA BALOTAJN REZULTOJN, DO BONVOLU SENDI AL NI FOTOJN PRI LA FINA KAMPANJO KAJ VIAJ FESTOJ ĜIS MARDO LA 9a. BONŜANCON AL ĈIUJ EN LA LASTAJ KAMPANJAJ TAGOJ!

KAMPANJAJ NOVAĴOJ DE MEMBRAJ PARTIOJ

JE BALOTA VESPERO: REZULTOJ EN INTERRETO

Vespere je dimanĉo la 7a de junio kaj http://europeangreens.eu/ kaj http://www.greens-efa.org/index.htm estos regule ĝisdatigataj per rezultoj tuteŭropaj, por ke ni povu vidi la progreson de la verdulaj partioj.

POLANDO

La verda tramo en Varsovio estis uzata por kampanja celo je la 1a de junio - la tago de la infanoj. Varsoviaj kandidatoj Agnieszka Grzybek kaj Krystian Legierski okupiĝis pri ĝi.

IRLANDO

Irlandaj Verduloj trovis romantikan manieron por antaŭenigi sian kampanjon. Senpagaj veturadoj ĉirkaŭ Dublin estis ofertataj en speciale projektita 'eco-cab' (ekologia veturilo). Ni esperu, ke la pedalpotenco tradukiĝos en politikan potencon!

BELGIO

Grupo de kuristoj de la Verduloj/EFA Grupo, kaj kuristoj de la belgaj Verdaj partioj Ecolo kaj Groen! kuris 20 kilometrojn en Dimanĉaj Bruselaj 20km!! La teamo nomiĝis la Verdaj Novaj Konvenciantoj. Subtenantoj vestitaj per "PENSU VASTE, VOĈDONU VERDE"- T-ĉemizoj hurais ilin ĉe diversaj lokoj survoje. Gratulojn al ĉiuj kuristoj, kiuj kompletigis la vetkuron malgraŭ la varmo kaj al Heike Leberle por ŝia grandioza organizaĵo. Voĉdonadaj aŭguroj por Ecolo estas aktuale super 20%, kaj por Groen! inter 9 kaj 10%.

GREENYOUROPE TRANSLIMA TURNEO

La translima turneo Greenyourope daŭrigis sian vojon kaj agadojn tra germanio, Belgio kaj Nederlando. http://www.greenyourope.net/

HUNGARIO

Ĉi tiu semajno estas gravega por LMP! Kun kelkaj balotadaj aŭguroj pri 2%a subteno de la decidintaj balotontoj - kaj la ebleco, ke subteno por la pli malgrandaj partioj povus veni tuj antaŭ la balotadoj - LMP (Politiko povas esti alia) prepariĝas por fina puŝego en la venontaj tagoj. Ni revivigis nian kvestkampanjan retejon, kiu de nun ankaŭ haveblas en la angla: http://kampany.lehetmas.hu/campaign.php
Ĵaŭdon ni okazigos „frapantan verdulan koron" antaŭ la parlamentejo helpe de 1000 aktivuloj. Ni ankaŭ renkontiĝos por „Fermo de epoko", evento en Budapeŝto kun la subteno de popularaj hungariaj bandoj. Je vendredo ni bonvenigos EGP-proparolanton Philippe Lamberts (Ecolo) en Budapeŝto por publika evento kaj renkontiĝo kun reprezentantoj de hungariaj verdaj neregistaraj organizoj. Samtempe ni alvokas ĉiujn niajn subtenantojn sendi poŝtaĵojn, tekstmesaĝojn kaj Facebook-ĝisdatigojn al ĉiuj siaj amikoj - por certigi, ke la krita maso de verde balotintoj plialtiĝu dimanĉe kaj helpos nin malfermi novan ĉapitron en la hungaria politiko.

FRANCIO

Kun balotado stabila je 11% en Francio, la kampanjo estas prospera kun impona nombro da regionaj kaj naciaj renkontiĝoj tutlande. Por ĉiu tago en ĉi tiu semajno Europe Ecologie produktis poŝtkarton invitantan voĉdoni kaj instigi aliajn voĉdoni (vidu supre). Kampanjofermaj eventoj okazos en Clermont Ferrand je vendredo, la 5a de junio per koncerto kaj prezentado en Montluson kaj en Vesoul en la oriento de Francio de la lasta filmo de Yann Arthus Bertrand (vidu malsupre). Por pliaj informoj vidu ĉe http://www.europeecologie.fr/presse

GERMANIO

La vespero de la eŭropa balototago de la germania verdula partio okazos je dimanĉo, la 7a de junio 2009 je la 5h30 en Berlino ĉe Heinrich-Böll-Fondaĵo, Schuhmannstraße 8. Bundis 90/ La verduloj invitas vin esti la unuaj eksciantoj pri la rezultoj de la eŭropa balotado en Germanio kaj aliĝi al la vespero de la eŭropa balototago de la germania verdula partio.
La partianoj kune spektos la unuajn prognozojn sekvotajn de oficialaj komunikaĵoj de Rebecca Harms, favorato por Verduloj - Eŭropa Libera Alianco kaj „BÜNDNIS 90/DIE GRÜNEN", kaj ankaŭ de Reinhard Bütikofer, favorato en la Eŭropaj balotadoj por „BÜNDNIS 90/DIE GRÜNEN".

SVEDIO

La balotaŭguro aktuale montras 10%n, de nun ĝis dimanĉo Svedaj Verduloj ĉeestos en la centra stacio en Stokholmo. Estas instalaĵo ilustranta klimatŝanĝiĝon, tekoj estas disdonataj, pintaj kandidatoj (vidu malsupre pri Isabella Lovin) parolados, estas distraĵoj kaj konkursoj, premioj estos atribuataj, okazos senpagaj masaĝoj kaj politikaj intertraktoj (vidi paĝon pri EGP eventoj por aliaj svediaj eventoj ĝis dimanĉo).

SLOVENIO

SMS (Slovenia junulara partio) Stranka Mladih Zeleni Evrope organizis finan debaton je la 2a de junio pri Verda Nova Konvencio. La diskuto koncentriĝis pri kiel eviti klimatŝanĝon kaj la neceso fari tion.

GREKIO

La foto montras la centran voĉdonadan pavilonon en Ateno kun lumelektra sistemo. La Grekaj kandidatoj por la eŭropa parlamento lastatage havis tutplenan horaron inkluzivantan la partoprenon ĉe eventoj kaj gazetaraj konferencoj okazantaj en kelkaj urboj en Grekio. Precipe je vendredo, la 5a de junio, okaze de Tutmonda Mediotago 2009, kelkaj eventoj estas organizataj en Ateno kaj en aliaj lokoj. La aŭguroj pri eŭropaj voĉdonadoj: dum la lastaj tagoj estis almenaŭ du televidaj stacioj, kiuj montris, ke la indicoj de Oikologoi - Prasinoi plialtiĝis de 6% al 8,5%.

MALTO

Germana Verdula EP-ano Gisela Kallenbach kaj kandidatoj Arnold Cassola kaj Yvonne Arqueros Ebejer vizitis Solar Solutions Ltd en Gharghur. Reprezentantoj de Solar Solutions klarigis la diversajn alternativajn energisistemojn, kiujn la firmao provizas. Germana verdula EP-ano Gisela Kallenbach diris, ke la instigoj por alternativaj kaj puraj energisistemoj, kiaj preferataj energiricevaj tarifoj proponitaj de la Verduloj kaj efektivigitaj, kiam la Registaro en Germanio akcelis la alternativenergian sektoron, dum ĝi helpos redukti eligadojn kaj poluadon, ankaŭ kreos centmilojn da laborpostenoj sole en tiu sektoro. Ŝi diris ke la Verduloj estas la avangardo en Eŭropa Parlamento antaŭenigante puran kaj daŭrigeblan energiproduktadon. Ŝi diris, ke ekzistas financadoj, kiujn Malto povas uzi ĉirilate.

SKOTLANDO

El gazetara komunikaĵo de skotaj Verduloj: Je mardo, la 2a de junio, 2 tagojn antaŭ la tago de la balotado, Verdula Partio hodiaŭ publikigis voĉdonadajn informojn de ComRes, kiu metas la partion je 18% en Skotlando, je la trian vicon, antaŭ la Konservativuloj kaj Liberal-demokratoj. Se ripetota je ĵaŭdo, ĉi tiuj nombroj igus Skotlandon reveni kun 2 SNP EP-aoj, 2 de Labour, kaj po unu el Skota Verdula Partio kaj el Konservativuloj. La tut-britiaj nombroj montras Verdulojn okupi la kvaran vicon per 15%, denove antaŭ la Liberal-demokratoj. Elaine Morrison, la pinta kandidato de Skota Verdula Partio en la ĵaŭda eŭropa balotado diris: "Se homoj en tuta Skotlando volas priveti partion kun klara perspektivo por pli bona politiko, ili havas nur unu kredindan kandidaton - la Skota Verdula Partio. " Por pliaj informoj pri ĉi tio, iru al http://www.scottishgreens.eu/

ANGLIO KAJ KIMRIO

Verda partio de Anglio kaj Kimrio produktis balotan videon pri kiel la balotsistemo funkcias kaj kial verdule elekti estas decide grave. Vidu: http://www.youtube.com/watch?v=fv0uHWxhLgs&eurl=http%3A%2F%2Fwww.greenparty.org.uk%2F&feature=player_embedded

NEDERLANDO

De Groenen okazigis eventon en Utrecht je la 30a de majo, dum kiu ili renkontiĝis kun Herman van Veen, kiu subtenas la listestron Otto ter Haar. Otto kaj partiestro Paul Freriks kampanjis kun la kantisto, kiu deŝutis la balotadan programon esprimante sian subtenon por De Groenen (vidu foton)

NOVAĴOJ DE EŬROPAJ VERDULOJ

Ligilo al balotadaj datoj estas en la retejo http://europeangreens.eu/menu/election-dates/

FILMO DE YANN ARTHUS BERTRAND "HEJMO"

Prezento de "Hejmo", filmo pri la tero el la ĉielo de Yann Arthus Bertrand je la 5a de junio dokumentare malfermas kinejojn en pli ol 80 landoj, ĝi ankaŭ estos montrata de francia publika televido, de Air France Aviado kaj de multoblaj senpagaj publikaj prezentoj tutmonde, interalie en Novjorka Centra Parko. Vendoj de DVDoj kaj senpaga Interreta fluo tuj haveblos - ĉio je la 5a de junio.

AUSTRIO/ SLOVAKIO

Ulrike Lunacek, estro de la listo Aŭstriaj Verduloj, renkontis la Slovakajn Verdulojn en Bratislava je sabato. Aŭstriaj kaj slovakiaj verduloj ankaŭ kampanjis kontraŭ planita atomreaktoro ĉe la ejo de Bohunice. Vojaĝo sur Danubo por kampanji por gejaj kaj lesbaninaj rajtoj ankaŭ okazis. Balotada kunveno okazos en Vieno je la 7a de junio ĉe Colosseum 21, Andreas Hofer Straße 28, 1210 de 16.00 - 02.00 h. Feliĉa festado!

NEDERLANDO

Nederlando voĉdonos morgaŭ, je ĵaudo la 4a de junio. Diversaj opinisondadoj montras, ke GroenLinks atingos inter 8 kaj 10%. Tio rezultigos almenaŭ du seĝojn. La kampanjo estas prospera. GroenLinks okazigis diversajn piknikajn eventojn en sep urbegoj en Nederlando. Hodiaŭ kaj ĵaudon GroenLinks videblos en ĉiuj grandaj fervojaj stacioj, kie lokaj kampanjantoj kaj kandidatoj provos konvinki veturantojn 'Pensi vaste kaj voĉdoni verde' je la 4a de junio. GroenLinks ankaŭ estas videbla en amaskomunikiloj. Hieraŭ vespere pinta kandidato

Judith Sargentini estis la sola politika gasto en populara babila evento en la nacia televido. Ĉi-vespere, Sargentini aliĝos al la balotada debato kun kvin el la aliaj plej grandaj Nederlandaj politikaj partioj en la nacia televido (Ned 2, 20.50).

ESTONIO

Estoniaj Verduloj kunlabore kun aktivuloj de Estoniaj neregistaraj organizoj por biciklovojoj aranĝis eventon por atentigi pri la stato de la biciklovojoj en Tallinn. La celo estis fari bicikladon pli populara ĉe la urbanoj. Michael Cramer - Germana EP-ano kaj sperta proparolanto por aferoj pri urba transportada politiko ĉeestis. Biciklado de la flughaveno al la estonia parlamentejo en la urbocentro estis organizita. La komuna agado finiĝis per la renkontiĝo. Oportunoj por bicikla trafiko en Tallinn estis diskutataj kun s-ro Cramer.
http://www.tallinnapostimees.ee/?id=122778
S-ro Tõnu Trubetsky, famkonata rokmuzikisto, poeto kaj estonia EP-kandidato, muzikis en rokkoncerto. La muzikado estis sekvata de parolado. Tri verdulaj EP-kandidatoj, s-ro Strandberg, s-roTrubetsky kaj s-ro Lotman, klarigis la Verdulan platformon al la aŭdantaro.

Wiertzstraat 31, B1050 Brussels, Belgium | T: +32 2 622 07 20 | F: +32 2 626 07 29 |
europeangreens@europeansgreens.org
www.europeangreen.eu | www.europeangreens.ning.com | www.twitter.com/greencampaign09
www.europeangreens.eu/facebook | www.youtube.com/europeangreens